



Komencanto



Nadejda Lofkina [Glazov, Rusio]

Neforgeseblaj vintraj tagoj

internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

novembro
- decembro

Wang Minhao – multjara E-aktivulo el Ĉinio, Prezidanto de Ŝanhaja E-Asocio, (Ĉinio) rakontas pri sia esperantistiĝo – Inventita en Ĉinio.
Verkoj de niaj legantoj: popola fabelo, lirika rakonto, tradukitaj humurajoj pri sciencistoj. – Diversaj ondoj el bunta mondo: simboloj de Rusio.
Aforismoj; ŝercoj kaj anekdotoj. – Gramatika leciono de J-L Tortel.
Utila amuzajo: divenu Zamenhofajn proverbojn – Korespondu!

6 (74)

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

- UEA** - Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando
- Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910
- Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.
- Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson
St., Redfern N.S.W. 2016
- Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000,
Antwerpen
- Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia
(DF) - BR - 70084-970
- Britio** David Kelso, 5 Craighenhill Road, Carluke, ML8 4QT
- Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorĥka 1, CZ-696 62 Strĥznice
- Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037,
Beijing
- Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.
- Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.
- Finnlando** Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
- Franco** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Ceri-
saie, 75004, Paris.
- Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse,
9 D-55129 Mainz.
- Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada
n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.
- Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184,
TEHRAN
- Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoreisi, 38, 20143, Mi-
lano.
- Italio, Kroatio, Slovenio** Viŝnja Branković
Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste
- Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood,
Dublin 6W
- Japanio** Japania Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to,
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3
- Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-
08200, Sabadell
- Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa
11300, Havano
- Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k.
167.
- Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18,
N-0572 Oslo
- Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews,
Christchurch 8004
- Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-
137, PL-01-865 Warszawa
- Portugalio** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto,
N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa
- Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8,
SE-242 35, Horby
- Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH —
4224 Nenzlingen
- Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El
Cerrito, California 94530, U.S.A.

Tempo flugas! Finiĝis la jaro kalendara 2008-a kaj jam 11-a jaro de sinsekva apero de nia revuo. Ni pardonpetas ĉe la legantoj, ke pro multaj malhelpegaĵoj (malsano de la redaktoro, financaj malfacilaĵoj k.a.), "Komencanto" lamis fine de la jaro. Bedaŭrinde tiu ĉi antaŭjarŝanĝa numero longe kuŝis jam preta kaj nur nun ni povas dissendi ĝin, kune kun la unua ĉi-jara kajero. Spite al ĉiuj malfacilaĵoj, ni penas elturniĝi kaj daŭrigi la eldonaferon, ĉar al tio nin instigas niaj fidelaj multjaraj legantoj kaj amikoj, kiujn ni elkore dankas pro la grava por ni subteno.

Karaj legantoj, en tiu ĉi numero de "K" ni ĝojas prezenti al vi konatan aktivulon de Azia E-Movado, Prezidanton de Ŝanhaja Esperanto-Asocio, s-ron *Wang Minhao*. Ni konas lin persone de la tempo, kiam ni kune estis gastoj de 92-a Japana E-Kongreso en Jokohamo kaj povas aserti, ke li faras grandan laboron por la prospero kaj la progreso de Esperanto en Ĉinio. Do legu en "Kiel tio komenciĝis" pri lia vojo al Esperanto kaj lia agado per la lingvo. Kaj sur la najbaraj paĝoj vi trovos ankaŭ materialojn pri Ĉinio – rakontojn pri inventoj, siatempe faritaj en tiu ĉi lando, kiuj nun estas uzataj en la tuta mondo.

Ĉe "Verkoj de niaj legantoj" legu esperantigitan de Anatolij Fjodorov popolan fabelon "Du frostoj", kies enhavo fakte portas internacian karakteron kaj en pluraj modifoj renkontiĝas ĉe multaj nordaj popoloj. Poste sekvas du aŭtoraj debutoj – tradukprovoj diversĝenraj: lirika rakonto "Magia ombrelo", sendita de B. Willsonn el Usono kaj humuraĵoj pri sciencistoj, tradukitaj Maksim Petrov el Kazahio.

En la rubriko "Diversaj ondoj el bunta mondo" Vladimir Opletajev rakontas ĉi foje pri ŝatataj de ĉiuj rusianoj fabelaj personoj, kiujn kuraĝe eblas nomi nun "simboloj de Rusio". Sur humuraj paĝoj vin, kiel kutime, distros aforismoj, ŝercoj kaj anekdotoj. Sed tre gravas trovi la tempon ne nur por distro, ankaŭ por lerno kaj perfektigo en la lingvo. Des pli kiam eblas tion fari tute ne enue pere de gramatika leciono de J-L Tortel kaj serĉante kaŝitajn Zamenhofajn proverbojn en la apuda paĝo!

Agrablan legadon, lernadon, verkadon!

la red.

Komencanto

2008 numero 6 // (74) regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Raja Kudrjavceva

adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2009:

internacia tarifo: 18 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 15 eŭroj;

aerpoŝta aldono 2 eŭroj

konto ĉe UEA: [vkud-a](#)

rusia tarifo: 240 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Dr. Wang Minhao, profesoro, lingva instruisto, konata E-aktivulo en Ĉinio kaj en Azia E-movado, multjara Prezidanto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio.



Esperanto ŝanĝis mian vivon

Asocio klopodis ŝanĝi mian laboron kaj finfine sukcesis. Do, poste mi eklaboris en la Asocio kaj samtempe laboris en Akademio de Socia Scienco, kie troviĝas preskaŭ 140 diversaj asocioj. Esperanto-Asocio estas unu el ili. Do, Esperanto ŝanĝis mian laboron kaj ŝanĝis mian vivon. Eble sen lernado de Esperanto, mi ĝis nun estus instruisto de la rusa lingvo.

En la jaro 1984, mi komencis akcepti eksterlandajn esperantistojn. Mi bone memoras, ke mia unua gasto estis japana esperantisto. Kaj poste mi akceptis grupon de esperantistoj, ankaŭ el Japanio. Tiutempe la ĉina registaro invitis 3000 gejunulojn el Japanio viziti nian landon, inter ili estis esperanto-grupo, konsistanta el 500 geesperantistoj, iuj el ili ankaŭ nuntempe estas niaj amikoj. Tiam mi akompanis ilin dum la vizito de Ŝanhajo kaj libere parolis kun ili. Unufoje mi spertis, ke Esperanto estas tre bona lingvo por komuniĝi kaj amikiĝi. Estinte sekretario de Ŝanhaja Esperanto-Asocio mi havis multe da ŝancoj akcepti alilandajn esperantistojn ĉiu-jare. Do, mi povis multe praktiki la lingvon, kaj mia lingvonivelo pli kaj pli altiĝis.

Nuntempe mi havas multajn amikojn tra la tuta mondo. Laŭ mi, naciaj lingvoj ne permesas tion atingi. Pro tio mi ege ŝatas Esperanton kaj klopodas sindone labori por nia kara lingvo. Ofte iuj alilandaj amikoj demandis min: "Kial vi lernis Esperanton? Kial vi ŝatas ĝin?" Mi ĉiam respondis, ke Esperanto estas neŭtrala lingvo kaj por mi tio estas ege grava. Nur per Esperanto ekzistas egaleco inter ni,

ĉiuj esperantistoj, malgraŭ diversecio de landoj kaj nacioj. Surbaze de tiu egaleco ni povas plifacile interamikiĝi.

Esperanto estas bona komunikilo inter nacioj, ja lerninte iun nacian lingvon, ni ne povas tiel bone paroli en ĝi kiel en la patrina lingvo kaj ne ĉiam bone esprimas niajn pensojn aŭ ideojn.

Tamen, tute ne sufiĉas scii nur la lingvon, ĉar ni ĉiuj devas multe lerni pri la kulturo, historio, kutimoj de diversaj nacioj kaj tiel plu. Tiamaniere oni ekposedas la enhavon de la parolado. Lingvo estas nur la ponto kaj ilo, kiu povas helpi vin esprimi vian penson, ideon aŭ vian scion. Do, gravas lernado en diversaj kampoj.

Kiel Prezidanto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio, mi ege deziras ke nia Asocio havu pli da kontaktoj kun alilandaj esperantistoj. Oni scias, ke Ŝanhajo estas internacia urbo, kaj ĉiujare multaj esperantistoj el diversaj landoj venas al nia urbo por turismo, komercado, scienca kaj kultura interŝanĝo...

Karaj esperantistoj, kiuj volas viziti nian urbon, unue, sendu al mi mesaĝon, kaj informu min pri via alvena dato kaj kiel eblas kontakti vin. Poste ni povas pli detale aranĝi vian restadon en Ŝanhajo.

Mian nomon eblas trovi en la Jarlibro de UEA, kaj tie troviĝas mia adreso, retadreso kaj mia telefonnumero.

Mi varme bonvenigas vin viziti nian urbon!


Mi lernis Esperanton antaŭ 24 jaroj, tamen fakte mi sciis pri Esperanto antaŭ 40 jaroj, kiam mi estis studento de universitato. Mia fako en universitato estis rusa lingvo. Tiam mi jam sciis, ke Esperanto estas tre bona lingvo por internacia interkomuniĝo. En la jaro 1964 iuj miaj samklasanoj de la universitato jam komencis lerni ĝin. Sed mi komencis lerni la lingvon en la jaro 1983, tiam mi partoprenis en la unu-jara kurso de Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Unufoje semajne ni havis lecionon, niaj instruistoj estis s-ino Qian Minqi kaj tiama raportistino de Radio Pekino s-ino Xu Wenqi. Ĉiuj scias, ke lernante la lingvon, oni ne nur pene studas dum lecionoj, sed ankaŭ post lecionoj. Mi estis studento de fremdlingva fakultato, do, mi bone sciis, kiamaniere oni povas ellerni fremdlingvon.

Ja por tio mi mem lernis Esperanton krom la kurso. Tiamaniere post 80 horoj mi ellernis ĝin. Kaj poste Ŝanhaja Esperanto-Asocio deziris havi min kiel sekretario de la Asocio. Tiam mi estis instruisto de rusa lingvo en iu mezlernejo. La

Kio devenis el Ĉinio:




Kompasso



Proksimume antaŭ 4000 jaroj la ĉinoj inventis amuzan ludilon – tiel nomatan “Sudo-montrilon”.


Tio estis pupo, kiu (kiel ajn oni ĝin turnu), ĉiam rigardis al Sudo. Alia formo de Sudomontrilo vi povas vidi sur la apuda bildo. Tiu ĉi Sudomontrilo havis formon de kulero-ĉerpilo, bone polurita kaj glitanta sur speciala rando. Formo de tiu kulero-ĉerpilo imitis formon de Stelaro de Granda Ursino - Ĉiela Ĉerpilo. En la 11-a jarcento aperis naĝanta en akvo montrilo de kompasso, farita en formo de fiŝeto. Kiam ĝi naĝis, ĝia kapo montris al Sudo. Aperis ankaŭ aliaj variantoj de kompasso.

Alumetoj



La unuaj antaŭuloj de modernaj alumetoj aperis en 577 jaro de nia erao en Ĉinio. Tio estis malgrandaj pinaj bastonetoj, kiujn oni mergigis en fanditan sulfuron, poste ilin oni frotis laŭ io malmola kaj ili ekbrulis. Tiun inventaĵon oni dekomence uzis en la imperiestra palaco, sed poste ĝi disvastiĝis tra la mondo kun la nomo “bruligbastoneto”. En Eŭropo la unuaj specimenoj de alumetoj aperis en 1530, plej verŝajne tio estis portitaj el Ĉinio pere de vojaĝantoj, kiuj venis tien laŭ spuroj de Marko Polo.

Papero



Paperon inventis en Ĉinio en 105 jaro *Caj Lunj*. Li trovis manieron produkti paperon el tavolita interna parto de morusarba ŝelo. La ĉinoj scipovis pisti la morusarban ŝelon en akvo por disigi ĝiajn tavolojn, poste oni verŝis tiun miksaĵon en la specialajn ujojn, sur kies fundoj kuŝis malvastaj fibroj de bambuo. Post kiam la akvo forfluis, molajn foliojn oni metis sur glatan plataĵon por sekiĝi. Komercestoj el Ĉinio vizitis Samarkandon, tie la araboj eksciis de ili sekreton de produktado de papero kaj portis ĝin en Hispanion. Kaj de tie arto produkti paperon disvastiĝis tra la tuta mondo.

Papera mono



Estas konate, ke la unua papera mono aperis en la Subĉiela Imperio en 119 de nia erao, en provinco Siĉuanj en epoko de imperiestro U-di de dinastio Hanj. Uzo de paperaj monbiletoj donis efektivan puŝon al ekonomia prospero, vigligis komercon kaj la registaro plene kontrolis tiun profitdonan aferon. La plej sukcesa periodo de uzado de la papera mono en Ĉinio estis dum la unuaj jaroj de la regado de dinastio **Juanj**, ĝuste tiel nomiĝas nun la ĉina mono.


Silko



Historio de apero de silka ŝtofo komenciĝas de la 2600 jaroj antaŭ nia erao kaj estas ligita kun kultivado de morusarba bombikso. Ĉinoj dum pluraj jarcentoj gardis tiun sekreton, kaj ajna provo elveturigi papiliojn aŭ ovojn de la bombikso ekster Ĉinio estis punata per mortigo. Produktado kaj vendado de silko dum longa tempo estis bazo de ekonomio de Ĉinio, pro tio vojon, kiu ligis Ĉinion kun la cetera mondo, oni nomis Granda Silka Vojo.

Parcelano kaj China

Por angloparolanta loĝantaro de la tero parcelano kaj Ĉinio estas la samo, ĉar oni indikas ambaŭ per la sama vorto *ĉina*. La ĉinoj inventis konsistaĵon de dura parcelano proksimume en la sesa jarcento, do antaŭ 1000 jaroj ĝis oni komencis produkti parcelanon en Europo. Dum longa periodo parcelano restis unu el la plej dezirataj kaŝaĵoj de Oriento por Okcidentaj reĝoj. El parcelano oni faris ne nur manĝilaron, (la imperiestra korto ĉiujare mendis kaj ricevadis ĉirkaŭ 50000 teleroj kaj tasoj el parcelano), sed ankaŭ pupojn, benkojn, diversajn ekzotikajn konstruaĵojn kaj eĉ pagodon!



Teo

Estas interesa vorta paralelo. En la angla kaj aliaj eŭropaj lingvoj Ĉinio prononceblas kiel "Ĉajna" (*china*). La vorto **teo** en la rusa lingvo sonas kiel "Ĉaj". Certe, tiu vorto estas rekte ligita kun la nomo de la lando, kie aperis tiu fama trinkaĵo.

Oni scias kvin etapojn de disvolviĝo de ĉina tea kulturo:


770-476 j.j. a.n.e. oni uzis teajn foliojn, plejparte en rituaroj. 206 j.j. A.n.e. – 8 n.e. - oni komencis uzi teajn folietojn kiel elemento de manĝaĵo. Samtempe iĝas konataj kuracaj ecoj de teo. 220-280 j.j. n.e. teo iĝas signo de nobleco – ĝin trinkas nobeloj kaj kortumanoj ĉe la imperiestra palaco. 265-907 j.j. teo poiomete disvastiĝas tra la tuta lando kaj iĝas ĉiutaga trinkaĵo de ordinaraj ĉinoj. Tiu periodo ankaŭ estas tempo de disfloro de Budhismo. La budhaj monaĥoj dum siaj paroloj anstataŭ vino trinkis teon kaj tiel disvastigis ĝin ĉie tra la budhisma mondo. En epoko de Tan (618-907) tea arto disvastiĝas tre rapide. Aperis novaj teknologioj de kreskigo kaj prilaboro de teaj folioj.

Poiomete teo trafis al Japanio, Koreio, Indonezio, Tailando. Proksimume en mezepoko teo trafas en Europon. Ĉie dekomence teo estis signo de nobleco kaj uzis ĝin nur riĉaj kaj nobeloj kaj poste ĝi disvastiĝis kaj populariĝis inter ĉiuj sociaj tavoloj.



Flugantaj drakoj

Oni asertas, ke la unuan "flugantan drakon" elpensis kaj faris ĉino Lu Panj. Disvastigo de papero permesis tute facile fari aerflugantajn drakojn. Aeraj drakoj iĝis vere popularaj ne nur kiel amuzaĵoj dum diversaj festoj, sed havis ankaŭ praktikajn aplikojn – la ĉinaj kamparanoj per flugantaj drakoj kaptadis fiŝojn de la mezo de lago aŭ rivero. Ankaŭ oni uzis ilin en militaj aferoj – por porti kaj ĵeti sur la kapojn de malamikoj diversajn timigilojn kaj brulantajn objektojn. Ankaŭ de la flugantaj drakoj oni ĵetadis diversajn proklamaĵojn.




Pulvo

La unua dokumentita priskribo de konsistaĵo de pulva pulvoro apartenas al Daosa *alkemiisto* kaj kuracisto Sunj-Si-Mjao (601-682) en lia manuskripto "Valoraj receptoj", eksplodo de pulvora miksaĵo estas traktata kiel kuniĝo de malvarma kaj trankvila virina esenco "Inj" - salpetro kun varma kaj aktiva vira esenco "janj" sulfuro. Proporcioj de pulvo - 8 partoj de salpetro, 4 partoj de sulfuro kaj 1 parto de lignaĵa karbo. La ĉinoj ne uzis pulvon por militaj celoj. Nur kiam la pulvo trafis en Eŭropon proksimume en 1200-1300 jaroj oni aplikis ĝin por bomboj, fusiloj kaj kanonoj.



Piroteknikaĵoj

Por solena kaj gaja festo, dediĉata al veno de Nova Jaro ĉinoj elpensis diversajn piroteknikaĵojn, por fari kiujn ili uzis inventitan pulvon. Tiuj belaj kaj gajaj fajroj ne nur plibeligis la festenojn, sed per laŭtaj eksplodoj oni ankaŭ forpeladis Malbonajn Spiritojn for de iliaj hejmoj.



Esperantigis Anatolij Fjodorov [Novoaltajsk, Rusio]

Du Frostoj

popola fabelo



Estis-ĉeestis du fratoj, du Frostoj. Ŝatis la fratoj ludi kaj distriĝi, tra arbaroj kaj tra kampoj amuziĝi, homojn frostigi, neĝon faligi, arbojn vesti en neĝajn robojn; montojn, kampojn kaj vojojn kovri per dika neĝa kovrilo.

Foje flugas la fratoj-Frostoj super la kampoj, inter si parolas, diras unu Frostoj al la alia:

— Frato Frosteto — ruĝa nazeto! Estas enue sen aventurre flugi, eble ni la tempon pli gaje pasigu — homojn frostigu?!

La alia Frato respondas:

— Frato Frosteto — Blua Nazeto! Vi ja scias, ke mi tre ŝatas amuziĝi kaj kun homoj distriĝi — mi subtenas vian emon, do, ni trovu kamparon aŭ preterveturantan noblan riĉan sinjoron kaj ataku lin, tiel ke homo per la dentoj klaku pro la frostoj kaj malvarmo ĝis apero de glaciaj larmoj! Tial flugu ni arbaron, tie kaŝu nin post pinoj kaj abioj por

subite salti kaj ataki vojaĝanton aŭ preterpasanton, kiu estas tre kuraĝa, ĉar laŭ vintraj vojoj vojaĝas...

Dirite-farite. Ekflugis du fratoj, du aeraj akrobatoj en arbaron super kampo kaj kaŝiĝis post la trunkoj de abioj kaj betuloj atendante ĉe la vojo siajn viktimojn. Ĉu longe aŭ mallonge ili atendis, ni ne scias, tamen, ho!, jen aŭdeblas sur la vojo sonoriloj. De la dekstra flanko sonas laŭta bronza sonorilo, spiras unu ĉevaleto ne tre granda — tial klaras, ke veturas kamparano-vilaĝano sur la sledo kun la fojna stako aŭ sindirektas en la arbaron por lignaĵoj por hejtado de la forno dum tre longaj vintraj noktoj aŭ tagoj...

De alia flanko tintas tre tenere kaj tre fajne kvazaŭ ora sonorilo, sono maldika-melodika kaj ĉevaloj tiras gaje kaj rapide la ĉareton ege belan kun la oraj ornamaĵoj kaj koĉero kun la vipo, kiu kantas gajan kanton...

Klaras, ke veturas iu riĉa sinjoro kiu certe estas vestita en la fela varma palto...

La Frostetoj — du fratetoj decidis, kiu kiun tuj atakos. La Frosteto-Blua Nazeto estis pli juna, ol lia frato, Ruĝa Nazeto, kaj diras decide:

— Mi preferas tuj ataki kamparon-vilaĝanon, li ja estas malpliforta, pantalono kaj la jako jen malnovaj, kun la truoj, sur piedoj nur bastŝuoj, do, mi pensas, ke facile mi el li faros la glacialan statueton. Vi ja, frato mia aĝa, estas pli ol mi ja forta, vi ataku la riĉulon, kiu estas ekipita kvazaŭ urso — palto el zibela felo kaj ĉapelo el la vulpo, la botoj el lupa felo — kvazaŭ vera fortikaĵo kontraŭ frostoj li estas. Mi ne povos lin penetri — prenu vi ĉi tiun celon!

La Frostoj — Ruĝa Vosto nur ride-
tas:

— Juna vi estas, frato-frateto, sed estu kiel vi volas. Kuru vi al kamparano, kaj mi ĉirkaŭbrakumos la sinjoron varmvestitan! Kaj vespere renkontiĝu ni apud la pino, tre malnova, kiu staras ĉe la rando de la arbaro kaj rakontu ni frat-fraten, ĉu facile aŭ malfacile ni frostigis la viktimojn niajn? Ĝis vespero, kara frato!

Kaj la Fratoj klakis, fajfis kaj diskuris...

Ne sukcesis suno malaperi post la vintra horizonto, renkontiĝis niaj fratoj ĉe la olda pina arbo ĉe la rando de la arbaro kaj demandas:

— Nu, vi kiel?

— Pensas mi, — pli juna diras, — ke laciĝis vi kun riĉa sinjoro?! Kaj la celon ne atingis, ne penetris vi tra felaj varmaj vestoj al la korpo... Estis vere malfacile, ĉu mi pravas, kara frato?

Sed la aĝa frato nur ridetas ironie al la vortoj de la juna...



— Ho, - li diras, - Blua Vosto - frato-Frosto, - estas juna kaj nesperta vi en tiuj ĉi aferoj. Mi lin tiel frostigis, ke li ne varmiĝos ĝis la nokto aŭ mateno, ho!-ho! Estis vere tre amuze malvarmigi la sinjoron...

— Sed li estis varmvestita - fela palto kaj ĉapelo...

— Sed ne helpis liaj feloj, mi penetris tre facile post la palto, kaj la botoj, kaj ĉapelo... kaj atakis lian korpon kaj frostigis-malvarmigi mi lin bone...

Li nur pli kaj pli kaŝis sin en molajn felojn, pensis, ke la frostoj lin ne trovos kaj ne movis eĉ per unu sia fingro. Sed mi nur tion bezonis kaj atakis efektive - li nur en la urbo povis iomete refrostiĝi kaj surstraten elslediĝi. Nu, kaj vi kiel atakis vian vilaĝanon - kamparanon?

— Ehh! - Frato Frostoj - Ruĝa Vosto! Malbonan ŝercon vi kun mi ŝercis, kiam akceptis la proponon, kiun diris mi, naiva...! Volis mi frostigi tiun kamparanon tre facile - sed... rezulte ricevis batojn laŭ muzelo mia per la ŝtupo ege granda...

— Ho, rakontu, mia frato, kio estis en la vero?

— Kiel vidis vi, malriĉa kamparano-vilaĝano sled-veturis por lignaĵoj en la arbaron. Dum la vojo mi komencis lin penetri, sed ne timas tiu ulo, nur blasfemas:

jena-jena kaj majena estas tiu frostoj-vosto... Ofendiĝis mi, komencis pli aktive lin ataki, pinĉi, piki,.. sed apenaŭ sukcesis, - venis ni al la kampeto. Kaj eliris li el sledo, prenis la hakilon grandan kaj nu...haki, nu... hakadi la lignaĵojn kaj la arbojn - lignaĵeroj flanken flugas... "Nu, jen venis la momento", - pensas mi kaj tuj penetris sub la jakon, sed li per la hakilo svingas, trunkoj falas, lignaĵeroj ĉiufanken flugas...

Li varmiĝis, eĉ komencis ŝviti pro aktivaj hako-svingoj. Vidas mi - malbonas la afero, ne sukcesos mi sub la jakon longe sidi pro varmego de lia korpo, mem degelos... fine eĉ vaporo de li ekŝvebis. Mi rapidis for de la ulo. Pensas: "Kion fari?" Kaj la viro plu laboras kaj laboras.

Vidas mi, demetas li la jakon sian magran kaj pendigas sur la pinon.

Nu, - mi pensas, - jen venis momento taŭga - nun facile mi lin venkos... ja la jakon pro la ŝvito iĝis preskaŭ malseka. Mi penetris ĝin kaj faris ĝin glaciana. Nu, nun provu vesti vi la jakon via! - ridas mi, antaŭkontenta pri la sukceso de ruzaĵo mia.

Finis ulo la aferon, prenis la jakon, mi eksaltis eĉ pro ĝojo: jen amuza la momento! Tenas viro sian jakon en la manoj kaj insultas min (la frostojn) per la vortoj tre maldecaj, kiujn mi pro mia honto eĉ ne povas re-prononci.

La insultoj de la ulo min nur tre amuzas, sed ne tuŝas eĉ iome, ĉar mi vidas, ke mi venkos! Sed la viro prenis ŝtipon longan dikan kaj konemcis bati jakon sian, parolante: for la frostoj, for glacio, for malvarmo el la jakon mia. Li la jakon batas kaj min daŭre insultas. Mi jam volas foren kuri, ĉar la batoj estas fortaj kaj doloraj, sed el ŝtofo kaj manikoj de la jakon mi ne povas elbarakti. Sed li batas kaj denove batas jakon per la ŝtupo... mi apenaŭ forkuris! Kaj la tuta korpo doloras... Ĵuras mi - neniam plu kamparanojn en arbaro ataki, jen sufiĉas, estis bona... leciono!

- Jen, amiko, plu neniam vi elektu tiun celon, kiu ŝajnas pli facila.

- Do, amiko, ne ekzistas la rabatoj kontraŭ batoj.



John Dolman

Sub magia ombrelo

Esperantigis **Bill Willsson** [Fremont, Usono]

La profesoro estis juna kaj bela fraŭlo. Radio de lia talento ellumigis novajn inventojn en fizika scienco kaj samtempe bruligis radiojn de espero ĉe needziĝintaj virinoj de la scienca laboratorio, kie ili kunlaboris.

De unu flanko la profesoro levis la sciencon, de la alia – detruis. Ja la virino en la laborejo ne povas per la sama kapo pensi samtempe pri du objektoj: pri scienco kaj revu pri edziniĝo. Foje la direktoro petis la profesoron:

– Vi, profesoro, sola malboninfluas duonon de la virinoj de via laboratorio per telepatio. Karulo, edziĝu, alie vi al mi la tutan sciencon ŝanceligos.

Sed karulo, kiel ĉiuj talentuloj, estis kaprica kaj sintena. La dorso de la profesoro sentis, kiel dekduo de virinaj rigardoj tiras lin diversflanken de la problemoj de fiziko. Aldone li sentis en-vion kaj ĵaluzon de malsukcesaj viroj en la laborejo.

La profesoro jam delonge havis fianĉinon. Li plendis al ŝi, ke sentas, kiel la virinoj provas lin prisorĉi al si, ke tio malhelpas lin labori kaj ke li ne scias, kion fari.

Kaj en unu el tiaj plendaj tagoj la fianĉino donis al li ombrelon.

– Tio estas talismano, ĝi estas sorĉigita antaŭ via foto en sankta katedralo en Hindio. Tenu ĝin kun vi dum viaj vojaĝoj. Kiam al vi mal-facilos – imagu, ke vi malfermas ĝin super vi. Kaj se ege malagrablos – malfermu ĝin super la kapo en vero.

Post unu jaro ili geedziĝis. Nun ĉiufoje antaŭ longa vojo la edzino donis al li tiun ombrelon. Ĝi ĉiam estis kvazaŭ nova.

Kaj post dudek jaroj la akademiano volis ien flugi, jam sidiĝis en aŭton, sed ion rememoris kaj revenis hejmen. La edzino telefonbabilis, kaj li mem malfermis la ŝrankon., kien ŝi metis la magian ombrelon.

Malfermis kaj ekmiris. En la fora angulo de la virina ŝranko kuŝis kelkaj tute samaj novaj ombreloj. Li demandis:

– Edzino! Ĉu miaj magiaj ombreloj mult-obligas?

– Stultulo vi estas, kara mia. Mi aĉetis ilin en la urba vendejo siatempe dudek specimenojn. Tiun, la unuan, mi jam antaŭ dudek jaroj forĵetis.



Viktorija Litvinova [Ĥabarovskij kraj, Rusio]

La subaj spritaj rimarkoj de kaj pri sciencistoj estas unua tradukprovo de Maksim Petrov [Aksu, Kazahio], kiun li kuraĝis publikigi.

Sciencistoj rimarkis, ke...

Sciencistoj rimarkis,
ke aksiomoj estas multe pli oportunaj, ol teoremoj, ĉar la teoremojn necesas pruvi, sed aksiomojn – ne.

*

Sciencistoj rimarkis,
Ke se ĉiutage vekigi je 5 minutoj pli malfrue, post 288 tagoj homo denove vekigos en tiu sama tempo.

*

Sciencistoj montris,
ke antaŭ La Granda eksplodo surtere tamen estis Vorto, kaj tiu vorto estis “Singarde!”

*

Sciencistoj, memkompreneble, rimarkis
proksimiĝon de la monda financa krizo, sed ne sukcesis iun averti pro manko de financado (mono ĉe la telefon-konto).

*

Sciencistoj-oceanistoj rimarkis,
ke kaserolo, metita sur la fundo de Mariinskaja Profundaĵo, sub terura premo de la akvo transformiĝas je paton.

*

Sciencistoj-oceanistoj pli kaj pli ofte rimarkas, ke ilin kvazaŭ iu ŝanĝis – pri la maroj oni ne plu revas, interreto por ili anstataŭis vojaĝojn.

*

Sciencistaj hundoj rimarkis,
se ĝustatempe kaj korekte montri salivon, rezulte oni povas kaj Nobelpremion ricevi, kaj en kosmon senpage vojaĝi.

*

Du Sciencistoj rimarkis
unu al la alia, ke se la homaro plu multobliĝos kun la sama rapideco, do, eble ankaŭ ili, la sciencistoj, povas permesi al si multobliĝi.

Sciencistoj rimarkis,
ke ili odoras per virina parfumo, sed ne sukcesis klarigi tiun faktan al siaj edzinoj. Dume pri tio aperis kelkaj reciproke kontraŭaj hipotezoj.

*

Sciencistoj-virinoj rimarkis,
ke sciencistoj–viroj post seksumo forturniĝas kaj ekdormas tute same, kiel viroj–seruristoj aŭ viroj–kulinaroj.

*

Sciencistoj rimarkis,
ke horloĝo, respegulata en spegulo iras reen! Tiu fakto verŝas tute alian lumon al strukturo de tempo, de spegulo, de horloĝo, de sciencistoj kaj de malantaŭa parto...

*

Sciencistoj rimarkis,
ke en kredita kontrakto, en la plej suba parto de la lasta paĝo estas paragrafoj, presitaj per tre malgrandaj literoj. Malfrue rimarkis.

*

Sciencistoj rimarkis,
ke saketo de tea infuzaĵo estas preskaŭ same neelĉerpebla, kiel la universo, dum kondiĉoj de financa krizo.

*

Sciencistoj rimarkis,
ke homoj kun limigitaj menskapabloj, legante sian elektronikan poŝton, tenas dekstran manon sur museto...



Vladimir Opletajev [Surgut, Rusio]
Simboloj de Rusio

La kontribuado de Vladimir Opletajev al la rubriko ĉi-foje kongruas kun vintra sezono kaj prezentas ŝatatajn de ĉiuj rusianoj fabelajn personojn de jarŝanĝaj festoj.

Avo Frosto kaj Neĝulino



Origine Frosto estis antikva pagana diaĵo de slavoj (Zimnik, Koroĉun, Pozvird), kruela reganto de glacia malvarmo kaj neĝa vento senkompatate frostiganta homojn, ŝtelanta infanojn. Ĉe la orientaj slavoj la fabela Frosto (Moroz, Morozko) estis forĝisto, kiu vintra glaciigis riverojn kaj lagojn per sia natura fortego. Sed iom post iom Frosto transformiĝis el

kruela naturreganta despoto al bonkora kaj justa avo. La unua literatura priskribo de Avo Frosto estis entreprenita de V.F. Odojevskij en 1840 en la “Infanaj fabeloj de la avo Irineo”, kie la aŭtoro prezentis lin kiel grizharan bonkoran maljunulon kun la nomo Moroz Ivanoviĉ, kiu loĝas en glacia domo kaj dormas sur mola neĝa litkuseno.

Unuafoje Avo Frosto aperis en Rusio dum la Kristnaska abifesto en la jaro 1910, sed tiam li ne fariĝis populara fabelestaĵo ĉe la kristnaska laboro. Definitive Avo Frosto eniris la tradicion de la novjara festo por infanoj en Sovetunio kiel propaganda kontraŭfiguro de ateismaj intervenoj de komunistoj malrespektantaj kristnaskajn festojn. En la jaro 1937 Avo Frosto kun sia nepino unuafoje aperis en Moskvo por ĝojigi infanojn dum la oficiala novjara-festa balo. Sed feliĉe, li rapide seniĝis je ideologia subteksto kaj tre baldaŭ fariĝis nemalhavebla figuro akompananta jarfinajn kaj jarkomencajn porinfanajn festojn alportante malavare al geknaboj donacojn en sia granda kaj senfunda dorsosako.

La nuna klasika aspekto de Avo Frosto akumulis multajn antikvajn mitologiajn kaj ankaŭ modernajn trajtojn elpensitajn de aktoroj, reĝisoroj kaj literaturistoj. Liaj barbo kaj haroj estas arĝente grizaj kaj densaj, ili atestas

potencon, feliĉon, riĉecon kaj prosperon. La pelto estas tre longa, tuŝanta la maleolojn, ruĝkolora, kun suba rando pasamente farita el blanka cigna lanugo, ornamita per arĝentfadaj brodaĵoj de tradiciaj slavaj figuroj, krucoj, okpintaj steloj. Ankaŭ la ĉapo estas nepre ruĝa, ovalforma kaj brodita per arĝentaj fadenoj, dekorita per perloj, havanta triangulan eltondaĵon frunte sur la blanka cigna lanuga pasamento. Liaj ĉemizo kaj pantalono estas kudritaj el blanka lina ŝtofo kun blankaj geometriaj ornamoj. La trifingraj gantoj aŭ pugnogantoj devas esti ankaŭ blankaj, ĉar ili signas purecon kaj sanktecon de ĉio prenata el liaj manoj. La zono de Avo Frosto havas blankan koloron kun ruĝaj ornamaĵoj kaj simbolas ligojn inter junaj kaj aĝaj generacioj. Avo Frosto portas arĝentkolorajn aŭ ruĝajn botojn kun iom levita ŝupinto, kaj dum malvarma vetero li surmetas blankajn feltbotojn. La blanka kaj arĝenta koloroj estas simboloj de la Luno, nordo, sankteco, akvo kaj puro. La bastono de Avo Frosto estas farita el kvarca vitro, kiun pintas duonluno aŭ bovokapo.

La plej grava fakto, kiu unike diferencigas Avon Frosto inter samtemaj figuroj ĉe aliaj popoloj, estas lia nepino Neĝulino akompananta lin dum festaj ceremonioj. Neĝulino simbolas glaciigintan akvon.



En 1873 A. Ostrovskij verkis teatraĵon “Neĝulino”, en kiu ŝi rolas kiel filino de Avo Frosto kaj Belulino-Printempo kaj degelas fine pro la ardo de fajro. La fama rusa komponisto Rimskij-Korsakov scenigis en 1882 samtitolan operon, kiu rikoltis grandiozan sukceson. Neĝulino estas fraŭlino (ne knabeto) portanta nur blankajn vestojn kaj havanta surkape okradian kronaĵon arĝente kaj perle broditan.

Sian definitivan kostumon la nepino de Avo Frosto ricevis nur en 1935, kiam en Soveta Unio estis relanĉita tradicio de novjaraj festoj pli frue malpermesitaj de la registaro.

Fine de la pasinta jarcento dank’ al la helpo kaj granda apogo de la Moskva urba estraro la rusia Avo Frosto ricevis sian propran rezidejon en unu el la plej antikvaj kaj tradicie belaj rusaj urboj Velikij Ustjug. Tiu ĉi urbo (Granda Ustjugo) estis fondita en la jaro 1147 kaj apartenas al malnovaj historiaj urboj de Rusio. Ĝi situas en la nordorienta parto de Vologda provinco. En la 12-a jarcento la urbo ricevis la epiteton titolon “granda” pro rimarkindaj meritoj en la evoluigo de negocoj kaj famas ankaŭ hodiaŭ kiel centro de unikaj naciaj manlaboroj (tekstado, feltado, lignoĉizado), monak-eroj, arkitekturaj monumentoj kaj

muzeaj ekspozicioj. La ĉirkaŭaĵoj de la urbo apartenas al plej pitoreskaj lokoj de Rusio. Situante sur la bordo de la bela rivero Suĥona la urbo majeste respregulas en ĝia akvo siajn blankŝtonajn katedralojn, kampanilojn, palacojn.

Ekde 1999 en Rusio tre sukcese funkcias granda turista projekto “Velikij Ustjug-patrujo de Avo Frosto”. Por Avo Frosto estas konstruita ĉi tie bela palaco en malnova rusa stilo. Turistoj el la tuta mondo volonte vizitas ĉi tiun urbeton por ĝui neripeteblajn belaĵojn de la vintra fabela naturo kaj por ekkoni rusajn folklorajn tradiciojn. La poŝtejo de Avo Frosto ricevas ĉiujare plurajn dekmilojn da infanaj leteroj kun gratuloj, poemoj, desegnaĵoj, diversaj petoj kaj mendoj. Fine de ĉiu jaro okazas tradicia tutrusia festivalo de Avoj kaj Neĝulinoj, kiuj konkuras inter si por nomumi la plej bonan paron de la jaro.

Ek de la 2005-a jaro Avo Frosto solene kaj pompe festas sian naskiĝtagon, kiu estas la 18-a de novembro, ĉar en ĉi tiu tago venas en lian arbaran bienon veraj vintraj frostoj. Ĉi-okaze lin vizitas multaj gastoj kaj oficialaj delegacioj, liaj multnombraj diverspopolaj

kolegoj kaj venas ankaŭ Neĝulino, kiu loĝas en la urbo Kostroma.

Antaŭ kvardek jaroj Avo Frosto kaj Neĝulino komencis fari gratulvizitojn al malgrandaj infanoj en iliaj hejmoj, kaj la alveno de ambaŭ gerolantoj kutime estas por geknaboj granda surprizo, ĉar la vizito okazas laŭ kaŝa interkonsento kun la gepatroj, kiuj deziras, ke ilia fileto aŭ filino ricevu festan donacon sojle de la Nova jaro ĉe la novjara laboro el la manoj de la plej fabelaj kaj sorĉaj personoj tre ŝatataj de ĉiuj rusianoj.

La nova tradicio, kies radikoj fontas el tre foraj paganaj pratempoj sed kiu reale aĝas malpli ol unu jarcenton, estas nun tre grava kaj ĝojiga elemento plastike kaj emocie respregulanta belan kaj vivigan fabelon de arĝente blanka neĝo kaj vintra glaciiga malvarmo, kiujn regas Avo Frosto kaj lia nepino Neĝulino.



Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj...



Kolektis kaj esperantigis **Denis Komarov** [Ustj-Katav, Rusio]

Kiam profetaĵojn de Nostradamus provas deĉifri usonano, la plej interesaj eventoj okazas en Usono; anglo - en Anglio; ruso - en Rusio ktp.

*

Ne tre malfacilas antaŭvidi estontecon, multe pli malfacilas deĉifri hodiaŭon.

*

Ekzistas 3 tipoj de prognozoj - trafikaj, maltrafikaj kaj sciencaj.

*

Politikisto devas antaŭvidi, kio okazos morgaŭ, post unu semajno, post monato ktp. Kaj poste klarigi, kial tio ne okazis.

*

Mi denove iĝis je unu jaro pli juna, ol mi estos en la sekva januaro.

*

Kalendaroj ne havas rivalojn en arto antaŭvidi estontecon.



Bildo de **Izmailova Luiza** [Kuzneck, Rusio]

Pri astrologiaj prognozoj, antaŭvidoj, antaŭdiroj kaj profetaĵoj

Homaro atingis tiom altan ŝtupon de evoluo, ke ĝian estonton povas prognozi nur astrologio.

*

Homoj kredas, ke ili estas *neripeteblaj individuoj* kaj samtempe kredas je kolektivaj horoskopoj!

*

Tion, kion ciganino legas laŭ polmo de la homo, kutime estas skribita sur ties vizaĝo.

*

Ne indas kredi al profetoj, kiuj praktikas sciencajn metodojn.

*

Por aspekti saĝa, antaŭdiru estonton je cent jaroj antaŭen. Se vi volas aspekti stultulo - antaŭdiru, kio okazos morgaŭ.

*

En la 19-a jarcento nemultaj antaŭvidis, ke venos la 20-a.

*

Tiom multas antaŭvidantoj kaj profetoj, kaj tiom malmultas tiuj, kiuj povas simple ĝustatempe averti.

*

Li ĉion antaŭvidis, krom tio, ke ĉio ĉi realiĝos.

Trovis kaj esperantigis Oleg Nekludov [Buzuluk, Rusio]

Stultuloj ne tre multas, sed ili estas dislokigitaj inter ni tiel bone, ke renkontiĝas ĉiupaŝe.

*

Kuracisto al edzino de paciento:
— Ne plaĉas al mi via edzo...
— Al mi ankaŭ, sed li estas bona familiano!

*

Al la demando: “Ĉu vi uzas Interreton?” “jese” respondis 100% de enketitoj. Tio estas rezulto de ĵus farita Interret-enketado.

*

Dentisto eliras el la kabineto, kie restis paciento. Ekfumamas cigaredon, nerveze paŝas tien-reen. La asistantino demandas:

— Ĉu estas malfacila okazaĵo?
— Malfacilega! La kliento estas ege riĉa, sed ĉiuj liaj dentoj estas sanaj!!!

*

En la doganejo:

— Kio estas en la sako?
— Manĝaĵo por la hundo.

Doganisto kontrolas – la sako estas plena de vino kaj cigaredoj.
— Ĉu vi pensas, ke via hundo manĝos tion? – ironie demandas doganisto.
— Se ne manĝos – do ne manĝos, tio estas ne mia afero.

*

— Kiel sukcese konatiĝi kun fraŭlino en Interreto?
— Nu, eblas viziti kun ŝi paĝaron de bona restoracio.

Anonco ĉe la akceptejo: “Karaj gastoj! Se vi ion bezonas, kuraĝe turmu vin al mi, kaj mi klarigos, kiel oni povas tute facile loĝi sen tio.

*

— Rakontu, kiel frenezigiĝis via edzino?
— Ni turismis en montaro, kie estis bonega eho. Sed la edzino kutimis, ke ŝia vorto ĉiam estu la lasta...

*

Vi nur imagu, kiun parton de enspezoj ricevas telefonkompanioj nur de kvin vortoj: “Kie vi estas?” – “Jam proksimiĝas”.

Pri la krizo:
Unu bankoficisto telefonas al alia:
— Saluton!
— Saluton!
— Kiel vi fartas?
— Bone!
— Ho, pardonu, mi eraris...

*

Iu viro fanfaronas al la amikoj
— Hejme mi estas kiel tigro!
— Kiel do?
— Paŝas per kvar piedoj kaj senbrue...

*

Kuracisto al paciento:
— Vi plene resaniĝos, se ĉesos ludi pianon.
Post ŝia foriro la flegistino demandas:
— Doktoro, kiu ligo estas inter piano kaj ŝia malsano?
— Ŝi loĝas je unu etaĝo super mia apartamento.

* * *

El kolekto de Galina Fedina [Jasnij, Rusio]

Amikino plendas al sia amikino:
— Ĉu vi scias, kara, mi estas tiom sola..
— Kial sola? – miras tiu. — Ja ĉiuj scias, ke vi havas ne nur amantan edzon, sed ankaŭ belan amaton!
— Jen ĝuste tio estas la kialo – ili konstante esperas unu je la alia!

Iu viro gajnis en leterion grandan monsumon.
— Kiel vi sukcesis? – demandas lin konato.
— Ĉu vi kredas... Mi vidis sonĝon... Ses sepojn. Nu, mi ja decidis meti je 49 – kaj gajnis!
— Mi ne komprenis... Sesoble sep estas 42!
— Nu, se vi estas tiom klera – vi povas daŭre malgajni!

*

— Vi scias, mi hodiaŭ starigis al nia direktoro ultimaton.
— Kaj kion vi diris?
— Aŭ vi altigos al mi la salajron, aŭ mi maldungiĝos.
— Kaj kiel ĉio finiĝis?
— Ni akceptis kompromisan decidon: li ne altigas al mi la salajron kaj mi ne maldungiĝas.


*

Junulino al sia knabo
— Stultulo, kaj ŝercoj ĉe vi estas stultaj!!!
— Iĝu mia edzino...
— Ho!.. Ĉu vi serioze?
— Ŝercas, ŝercas...

*

Al junulino telefonas la gepatroj kaj demandas:
— Filino nia, kial vi nin ne invitis al via geedziĝofesto?
— Sed min al la via ankaŭ neniu invitis.

La anekdoton kaj la bildon sendis Ildus Garifullin, [Krasnoufmsk, Rusio]




— Vi ne imagas, kiel malfacilas kuiru veran fromaĝon en hejmaj kondiĉoj.
— Kial?
— Ĉar por tio bezonatas dekomence havi hejmon...

Karaj legantoj! Jen nova originala leciono de J-L Tortel kaj serio de Zamenhofaj proverboj por dezirantoj lerni malenue.

Johan' Luko Tortel [Le Belvedere, Francio]

Babilado 21



Saluton, karaj komencantoj!

Ni daŭrigu nian uzadon de proverboj, por pli bone senti la funkciadon de nia lingvo Esperanto.

Ne povas ĉiu homo esti papo en Romo

(bedaŭrinde, ĉar ni eble havus esperantiston kiel papon !)

En Romo indikas la lokon, sen ideo de movo. Sed papoj ne nask-iĝas en Romo; ili venas de alia urbo aŭ alia lando. Se ni dezirus ekzemple diri, ke ne venas ĉiu-tage nova papo al tiu urbo Romo, ni devus iom ŝanĝi nian diron:

Ne venas ĉiutage nova papo en RomoN (kun fina N). Kial? Ĉar Esperanto uzas apartan manieron por indiki la CELON DE MOVO; estas necese, ĉar ne estas la sama afero vojaĝi *en Hispanujo* (interne de ĝi) kaj *en HispanujoN* (venante de ekstere, ekzemple de Francujo).

Estas simple. La indiko de loko en frazo, estas komplemento de loko. Por indiki iun ajn komplementon, ni uzas aŭ prepozicion, aŭ -N (akuzativon).

1) uzo de akuzativo :

Oni maron admiras, se oni maroN ne iras

Tion oni povus diri pri ĉio bela sed danĝera : *oni vulkanon admiras, se oni vulkanoN ne iras! Iri maroN, iri vulkanoN, iri RomoN*. Jes, oni rajtas tiel paroli. Tamen en la ĉiu-taga lingvo oni prefere uzas AL, kiu estas pli preciza, ĉar -N jam estas uzata por

multaj tipoj de komplementoj: rekta komplemento (*maroN admiras*), komplemento de tempo, de mezuro. Tie Zamenhof povus skribi: *Oni maron admiras, se oni al maro ne iras*; sed li preferis ripeti *oni maron* por ekvilibrigi la du partojn de sia proverbo: afero de stilo, grava en Esperanto, kiel en aliaj lingvoj.

2) uzo de prepozicio :

Ne venos rato mem AL la kato (uzo de *al*)

De parolo ĜIS faro estas tre malproksime (uzo de *ĝis*)

Al kaj *ĝis* estas bravaj, sinceraj prepozicioj: ili honeste indikas al-movon, kaj nur tion. Do, nenia problemo kun tiuj du.

Problem-eto star-iĝas, kiam oni uzas alian prepozicion, pli trompeman, kiel *en, sur, sub*. Kial tromp-emaj? Ĉar ili povas indiki aŭ al-movon, aŭ sur-lokan movon.

Tiam, kion fari por esti certa, ke oni indikas al-movon? Oni simple uzas kune ambaŭ ebl-aĵojn, prepozicion plus -N:

Ni vojaĝos morgaŭ EN Hispanujo (ni jam estas en tiu lando)

Ni vojaĝos morgaŭ EN HispanujoN (ni al-venos el alia lando)

Ni do ne pensu, ke Esperanto volas al ni:

Ĵeti polvon EN la okulojn

volas al ni komplik-igi la aferon per tiuj du iloj ; ili male helpas la distingon, ili komplet-iĝas, kiel:

Du botoj faras paron

Se ni dub-etis pri la util-eco de tiu distingo, ni nur pensu pri la diferenco inter:

La bala-into balais sub la ŝranko

jen labor-ema balainto, kiu pur-igis eĉ sub la ŝranko

La bala-into balais sub la ŝrankoN

jen mal-laborema bala-into, kiu kaŝe pelis la polvon sub la ŝrankon, anstataŭ el-tiri ĝin!

Kiel faras niaj naciaj lingvoj? Ĉiu el-turn-iĝas laŭ sia povo; ekzemple:

La kato saltas sur la tablo (1) (ĝi jam estas sur ĝi kaj restas sur ĝi)

La kato saltas sur la tabloN (2) (ĝi venas el la planko);

la germana lingvo iom ŝanĝetas la vortojn :

die Katze springt auf deM Tisch (1)

die Katze springt auf deN Tisch (2)

la franca ne havas tiun ebl-econ ; ĝi do ŝanĝas la verbon:

le chat saute sur la table (2)

le chat sautille (salt-et-adas) sur la table (1)

Interese estus konsideri laŭ tiu ekzemplo la manieron de ĉiuj niaj naciaj lingvoj!

Ĝis !

Plej amike: J-Luko

Por trovi logikon helpos la gramatiko

Karaj amikoj!

Ĉi-sube estas ĉifritaj 15 klasikaj proverboj el Zamenhofa Proverbaro.

Necesas deĉifri la tekstojn de tiuj proverboj kaj sendi respondojn al la redakcio de "Komencanto". La tasko ŝajnas komplika nur de la unua rigardo. Se vi, tamen, rememoros E-gramatikon, finaĵojn, artikolon, prepoziciojn ks, vi povos tute facile trovi logikon kaj tralegi la tekstojn.

Sukcesojn!

15 klasikaj proverboj de Zamenhof

21-22 22-4-22-3-12-7 12-9-7 5-13-4-12-17 8-4-22-1 5-17-4-18-7-6-17 9-22-16-13-4-12-7

20-0-22 22-10-12-17-10 15-17-9-5-22, 10-22-21 26-22-1-5-22 8-4-22-1 20-17-9-5-00

17-4 8-9-7-12-22-3-12-7 3-17-1 23-7-9-12-7 26-22-4-8-17-10 4-17 10-7-9-12-7

22-6 11-22-9-19-7 3-17-1 4-13-21-7 7-23-12-22 10-0-21-17-10 17-4-13-21-7

17-23-17-18-4-17 15-7-9-12-7 8-4-0 17-12-0-6-2417-10 7-4 10-7-9-12-7.

22-20 22-4 10-13-18 4-17 12-22-9-7 17-8-22-9-17-10 4-17 15-22-9-7

22-6- 20-0-13 3-9-17-6-0-7 9-22-24-17-10 17-8-17-9-12-17 7-8-0-6-0-7

18-22-4-17-1 9-17-3-7-6-12-7-1 22-4 12-9-17-6-10 4-17 5-7-6-12-7-1

17-4 20-0-13 10-0-6-17-9-7 22-10-12-13 4-0-17 26-7-6-7-9-0

21-13 5-0-4-0-12-17-10 - 12-9-0-17 8-9-7-23-0-12-17-10

18-7-6-17 24-4-7-6-7 8-4-0 15-17-4-7-6-17-10 7-4 7-9-7

20-0-13 8-22-9-10-7-6-7 3-13-6 10-0-17 18-22-16-7-6-7

17-4 26-13-6-21-7 - 17-4 26-7-5' 4-22-19-0-7-6-7

8-4-0 18-7-6-22 6-22 23-17-9-0, 7-4 22-9-17-9-0

18-7-6-17 15-0-6-7 17-4 4-17 23-0-6-7



Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 20 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 48-jara komputilisto. Mi serĉas korespondantojn por praktiki Esperanton.
Int: naturo, ekologio, kuirarto, orienta filozofio. Ni povas skribi (retpoŝto) aŭ telefoni per skype.

s-ro Eric Theismann
Rue Noel Ulysse, 26 6900, On,
Belgio
eksterterano@gmail.com

Mi volas pligrandigi mian amikec-rondon. Mi atendas vin.
Interesoj: amikeco.

s-ro Ronaldo Negromonte
Brazilo
akvoaleto@gmail.com

Mi estas 75-jara emerita instruisto. **Int:** legado.

s-ro Camilien Lauzier
324 pascal, app.3 Boisbriand, p.q. j7g 2b2,
Kanado
kam2rous@videotron.ca

Mi estas 47-jara ortodoksa kristano, kaj volas babilo pri ĉiutaga vivo en eŭropaj landoj (mi estas civitano de Britio). **Int:** lingvoj, mezepoka muziko

s-ro Dmitri Mosier
810 W. Benton St. #203, Iowa City, IA 52246
Usono
orthohawk@juno.com

Mi estas 52-jara kaligrafistino. Interesoj: kulturo, artaĵoj, muziko. Mi interesiĝas pri via lando. Ĉion ajn mi scivolas.

s-ino Yumiko Fujii
2-17-9 Nishiyama-dai,
Osaka -Sayama
Japanujo
fujiiyumiko2003@ybb.ne.jp

Mi estas 24-jara studento, mi studas Informadan Sciencan en Havano, Kubo. Mi ŝatus kontakti kun geesperantistoj el la tuta mondo precipe kun gejunuloj. Mi multe ŝatus lerni la rusan lingvon pere de Esperanto. **Int:** lingvoj, teknologio, amikeco.

s-ro Ronald Baby Glez
Kubo
rbabyuci@gmail.com



Ŝulepov Aleksandr [Verhoturje, Rusio]

Mi estas Santiago. Mi havas 18 jarojn. Interesoj: libroj, ĵurnalismo, lingvoj, Mi volas korespondi kun geesperantistoj el aliaj kontinentoj por praktiki la lingvon kaj ekscii pri aliaj landoj.
Santiago Peribucez
Hispanujo
camdem@hotmail.com

Mi estas 17 jara fraulino. Ĉi jare mi finas mezlernejon kaj intencas ekzameni en Universitato. Parolas ankaŭ angle, deziras korespondi kun geesperantistoj el la tuta mondo. **Int:** muziko, fado, lingvoj kaj kulturoj.

Tamta Loliŝvili
Tbilisi, pos. Tebz 10 kv, 32 korp, loĝ.51
Kartvelujo
tamtahade@posta.ge

Mi estas knabo kiu ŝatus komunikiĝi kun la mondo. **Int:** lingvoj, skoloj, medito, historio. Mi estas internacia bakalaŭra studento kaj mi amas lerni lingvojn. Mi esperas ke vi kontaktos min!

Jake Pentland
Britujo
jake.pentland@gmail.com

Mi volus korespondi kun virinoj kaj trovi veran amikinojn. Mi havas 51 jarojn, nefumanto, ktp... Al mi plaĉas ESPERANTO. Mi povas ankaŭ paroli germane. **Int:** turismo, aktiva ripozo, bicikloj, korespondo, aŭtomobiloj.

s-ro Henryk Buczkowski
Pollando
henryk48@yahoo.de

Mi estas 28-jara liberecano, vagemulo, filozofemulo, vegetarano, feministo... Mi volas korespondi kun personoj el Ĉeĥio, Rusio, kun anoj de kontraŭtutmondiĝa movado kaj kun ĉiuj, por kiuj amikeco estas grava en tiu ĉi konsumada mondo :). **Int:** elektroniko, filozofio, kultura antropologio, literaturo, radio, sendependa punk-muziko, vago, petveturado, lingvoj (precipe Esperanto, ĉeĥa kaj rusa).

s-ro Wrybel Andrychyyw
ul. Starowiejska 14/5 ; PL-34-120 Andrychyyw
Pollando
pendumito@o2.pl

Mi estas 35 -jara pola instruisto, kiu estas feliĉa edzo kaj patro. **Int:** turismo, fotografio, bildkartoj, komputila teknologio. Mi tre ŝatus labori kun infanoj kaj junuloj, vojaĝi, foti kaj ricevadi fotojn. Per la korespondado mi volonte ekkonas diversajn landojn, kutimojn ktp. Ĝenerale mi estas tre gaja homo, kiu amas Esperanton, amikecon kaj pacon inter nacioj.

s-ro Radostaw Sienicki
Białe - Szczepanowice 10/4,
PL 07-325 Boguty, Pollando
Pollando
drks@op.pl

Mi estas 24-jara nova esperantisto kiu interesiĝas pri la paco en nia mondo kaj kredas, ke nur la interkomunikado de homoj povas solvi tiun problemon. Ĉiuj estas bonvenaj!

s-ro Abdou Gueye
Senegalo
gueyeabdou85@yahoo.fr

komencanto@r66.ru
http://esperanto-plus.ru/Koresponda_Servo.htm

